

# *Ora Ĵurnalo*

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGBLAS ĈIUTAGE

Numero 70, Februaro 2024



La labirinto en Slotsskogen en malfrua januara posttagmezo.


Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo.....	2	Sonas muziko de Bielsko-Biała, Pollando.....	12
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Esperanto en mia juneco, <i>Georgo Handzlik</i> .....	12
Espeporko meditas.....	3	La domo, <i>Georgo Handzlik</i> .....	13
Hajkoj en februaro .....	3	El SATIROJ aŭ SAT-IROJ, <i>Stefan kaj Walter Klag</i> .....	14
La enigma Labirinto en Slottsskogen – Den gåtfulla Labyrinten i Slottsskogen.....	4	La fratoj Leonkoro kaj la Kvarteto Leonkoro, <i>Oswald, Walter kaj Renate Klag</i> .....	15
Holokaŭsta memortago la 27an de januaro! .4		La fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren .....	15
Pri Johan Ludvig Runeberg (1804–1877), <i>Raita Pyhälä (Saliko)</i> .....	5	Violonistoj sur la kortoj de Gotenburgo antaŭ longe – Spelemän på Göteborgs gårdar för länge sedan, <i>Hans Dagerteg</i> .....	17
Konkludoj pri ĉielo kaj ombroj, <i>Carl-Olof Selenius</i> .....	8	Fritiof kaj Carmencita de Evert Taube, sveda trubaduro.....	18
Invento por pluva tago, <i>Josef Kříž</i> .....	9	”Tusen och en natt” – Esperanto- seminarium på Visingsö 7–9 juni 2024 .....	19
Strebo al pli solida naturo .....	9		
Rumana libro, nun tradukita en Esperanton	10		
Vinterhämplingar – Vintraj kanabenoj, <i>Renate Säfström</i> .....	11		



Grave havi bonan ekvilibron en la vivo kaj en la percepto de aferoj.



## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com).

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.



## Espeporoko meditas



☞ Memorindaj tagoj:

**27 jan: la Holokaŭsta Memortago**

**6 feb: la Nacia tago de la sameoj**

La samea flago havas la tradiciajn kolorojn de la sameoj: ruĝa, verda, flava kaj blua, kiuj venas de la samea kostumo, la "kolt". Ĝi estas uzata ĉie en Sápmi kaj de ĉiuj sameoj. Jen la signifo de la koloroj en la samea flago: ● Verda simbolas plantojn, naturon kaj la landon de Sápmi, kiu estas esenca por travivado. ● Blua reprezentas la akvon, kiu estas eliksiro de la vivo. ● Ruĝa signas fajron, varmon kaj amon. ● Flava simbolas la sunon.

☞ En Finnlando la 5<sup>a</sup> de februaro estas granda memortago. Tamen ankaŭ en Svedio oni konas **Johan Ludvig Runeberg**, fama poeto kaj verkisto de Finnlando, kiu skribis svede.

☞ Dum Esperantosabatoj ni strebas lerni po unu kanton por kunveno. Ĉefe ni elektas kantojn kun konataj melodioj. **Evert Taube** estas unu el la plej konataj svedaj trubaduroj. Pollando havas ja **Georgo Handzlik**, kiu kaj verkas kaj prezentas kanzonojn kun akompanado de sia gitaro. En UK 2018 lia filino Dominika ĉeestis kun ĉarma voĉo kaj violono.

☞ Lastsemajne en tuta Svedio oni kalkulis birdojn, kiuj venas al la birdmanĝejoj. Plej nombraj estas la granda paruo.

**Renate Säfström elektis**

**vintrokanabenojn** sur glaciaj plaĝaj herbejoj.

☞ **Konkludoj pri ĉielo kaj ombroj** Carl-Olof **Selenius** nomas sian artikolon. Ĉu vi pensas logike? Provu!

☞ Mi admiras personojn, kiuj povas trovi bonajn ŝercojn. **Stefan kaj Walter Klag** plenumas la revuon **SAT-IROJ** per ŝercoj. Mi elektis kelkajn el la aktuala numero.

☞ **Leonkoro** estas por mi la familia nomo de la fratoj Leonkoro. Sed en Berlino ĝi ankaŭ estas nomo de arĉinstrumenta kvarteto.

☞ Greenpeace uzas neperfortajn metodojn. Kio pri **Greta Thunberg**? Ŝi nun estas akuzata en Londono pro rezisto al la polico?

☞ **La labirinto en Slottsskogen kaj Violonistoj sur la kortoj de Gotenburgo** estas du novaj artikoloj de Ingegerd Granat. Ŝi konas multon pri la historio kaj la interesaj lokoj de Gotenburgo. Se vi venos al Gotenburgo, vi havos spertan gvidanton, se vi vokas Ingegerd. Imagu la tagon, kiam Gotenburgo bezonus **esperantistan gvidiston!!!!!!**

☞ Ĝis marto! / Siv

## Hajkoj en februaro

Sen ombrelo  
kaj jen vintra ekpluvo  
nu, nu ...



Mi abomenas vin, kornikoj  
kaj tamen – kiel belaj vi estas  
kontraŭ la matena neĝo

Bashō

# La enigma Labirinto en Slottsskogen

## Den gåtfulla Labyrinten i Slottsskogen

de/av Ingegerd Granat



De malproksime, la labirinto aspektas kiel se iu volus planti heĝon sed ne povus decidi kie, sed plantis iom tie kaj ĉi tie. Sed se vi iras inter la padetoj, kiuj kondukas en ĉiuj direktoj, kaj ne rezignas antaŭ ol vi alvenos al la mezo, vi povos vidi la magian "Okulon" de la artistino kaj dancistino Lisa Larsdotter Petersson. Estas itala mozaika okulo, kiu kuŝas sur la tero. Lisa Larsdotter naskiĝis en 1960 en Gotenburgo.

La labirinto situas proksime de la ludejo "Plikta" kaj estas populara ekskursita celo. Ĝi estis inaŭgurita en 14/6 1999. La sekvan jaron, la artistino proponis ĉi tiun artaĵon.

La temo de la artaĵo volas pensigi nin pri la bestoj troveblaj en la parko Slottsskogen. La serpentumaj serpentoj devas protekti la bestojn.

Liberigu la ĝojon kaj ludemon kaj eniru la padetojn kaj serĉu la "okulon", kiu gardas la bestojn, la venontan fojon kiam vi vizitos Slottsskogen.

På avstånd ser labyrinten ut som att någon skulle plantera en häck men inte kunnat bestämma sig för var, utan planterat lite här och där. Men om man ger sig in bland alla dessa gångar, som leder åt alla håll, och inte ger upp förrän man kommit till mitten kan man se konstnärinnan och danserskan Lisa Larsdotter Peterssons magiska "Öga". Det är ett italienskt mosaiköga som finns på marken. Lisa Larsdotter är född 1960 i Göteborg.

Labyrinten ligger nära lekplatsen "Plikta" och är ett populärt utflyktsmål. Den invigdes 14/6 1999. Året efter föreslog konstnären detta konstverk.

Motivet vill få oss att tänka på djuren som finns i Slottsskogen. Dom slingrande ormarna skall skydda djuren.

Släpp loss glädjen och leken och ge dig in i gångarna och titta efter "ögat" som vakar över djuren nästa gång du besöker Slottsskogen.

## Holokaŭsta memortago la 27an de januaro!

Ni atentigas pri la Holokaŭsta memortago elstarigante librojn, kiuj tuŝas la Holokaŭston.



AKADEMIBOKHANDELN



Ĉirkaŭ la mondo hodiaŭ, la milionoj da homoj, kiuj viktimiĝis de la holokaŭsto, estas honoritaj. Familioj, amikoj, geamantoj, maljunuloj kaj junuloj senkompatate perdis la

vivon kaj siajn amatojn. Ili ĉiuj portis siajn proprajn rakontojn. Rakontoj, kiujn ni neniam devas forgesi.

# Pri Johan Ludvig Runeberg (1804–1877)

de Raita Pyhälä (Saliko)

*Mia artikolo – ligiĝas kun la dato 5.2. kiu estas la tago dediĉita al la memoroj pri Johan Ludvig Runeberg. Kvankam ĉio tio jam estas malnova afero, mi tre entuziasmiĝis pri tiu famulo kaj ĝuis mian laboron verki ion por OĴ.*

*En mia teksto mi uzis majusklon por monatoj, ĉar mia franca amiko ĉiam tion faras kaj mi legis, ke Zamenhof mem majuskligis la monatojn. Se vi tamen deziras minusklojn, ŝanĝu miajn majusklojn en minusklojn. /Raita*

## RUNEBERG, Johan Ludvig, poeto, preleganto, profesoro

Johan Ludvig Runeberg estis elstara lirika kaj epopea verkisto; lia verkado prenis specialan signifon pro la tempo kaj medio en kiuj li funkciis.

Dum la 1830-aj kaj 1840-aj jaroj, Runeberg kreis idealan bildon de la homoj kaj naturo de Finnlando, kaj per la rakontoj de Fänrik Stål li donis al Finnlando moralan identecon. La ideologio de Runeberg estis bazita sur la nov-humanisma idealigo de klasika Grekio, kaj

saĝe ĝi estis en linio kun la konservativismo dum la tempo de imperiestro Nikolao la 1-a.

Antaŭ ĉio, kiel la kreinto de la sento de patrujo kaj kiel la aŭtoro de la nacia himno de Finnlando, "Nia Lando", Runeberg akiris grandan gravecon kiel kulta figuro jam dum sia vivo kaj precipe post sia morto.



*La virgulino Finnlando, skulptita de la filo de J.L. Runeberg – Walter Runeberg.*

*Juna Johan Ludvig, skulptita de lia filo.*

*Raita fotis.*



## En la hejmo de la skaldo Johan Ludvig Runeberg

En la muzeigita hejmo de J.L. Runeberg en *Borgå* vekiĝas pensoj pri lia kariero kaj lia rolo en la naskiĝo de la konceptoj "Finnlando" kaj finna kulturo.

Ekde 1854 la 5a de Februaro en la finna kalendaro nomiĝas *Runebergin päivä*, la Tago de Runeberg. Li ja naskiĝis en la 5a de Februaro en 1804



*Busto, farita de lia filo.*

en *Jakobstad*. Lia lasta hejmo ĝis lia morto (1877) situas en Borgå. Tiu hejmo estas malferma tra la jaro. La antikvaj mebloj, la pentraĵoj sur la muroj, la grandaj verdaj endomaj plantoj tie kreas etoson de la 19a jarcento. J.L. Runeberg famiĝis en Finnlando, Rusio kaj Svedio pro siaj verkoj, instruado en lernejoj kaj private. Li estis profesoro, tradukisto, eldonisto.



*Modeloj de Runeberg-tortetoj en la muzeigita hejmo.*

Ne nur J.L.R. famas. Lia duagrada kuzino kaj edzino **Fredrika Tengström** (1807–1879) estis unu el la plej kleraj finninoj siatempe. Ŝia skribotablo, iom pli malgranda ol tiu de la edzo, daŭre troviĝas en la muzeigita domo.

Kvankam ŝi naskis 8 gefilojn, el kiuj du mortis, kaj kvankam ŝi zorgis pri la kuirejo kaj legomĝardeno, ŝi sukcesis verki du romanojn kaj kontribui al gazetoj. Ŝiajn opiniojn oni respektis. Tre gravis al ŝi la liberigo de virinoj kaj la pliboniĝo de ties statuso.



*Pelargonio en la vestiblo. Stikaĵoj el la malnovaj plantoj de Fredrika.*



En siaj malmultaj liberaj momentoj ŝi kvazaŭ aerumis sian kapon kaj konsolis sian koron per verkado. Tio por ŝi estis ripozo el la praktikaj hejmaj taskoj.

Ankaŭ la ĝardeno ĉirkaŭ sia hejmo distris Fredrika-n, precipe kiam ŝi ne plu bezonis kultivi legomojn kaj fruktojn por manĝigi sian grandan familion. Tiam ŝi rajtis ekplanti pli da floroj kaj arbustoj. La edzo paraliziĝis en la aĝo de 59 jaroj kaj poste kuŝadis enlite dum 14 jaroj ĝis sia morto. La filoj provis helpi lin farante mem radseĝon por ke li

povu esti movata en la hejmo kaj sidi dum la vizitoj de lernantoj, geamikoj kaj adorantoj, kiujn Fredrika regalis per grogoj, teo, kuketoj aŭ biskotoj. La seĝo estas kovrita de belkolora flora ŝtofo. Ĝi daŭre staras apud la komuna lito de la hejmmuzeo. La kapo de la skaldo ne kripliĝis, nur la membroj.



*En la ĝardeno de Fredrika Runeberg.*

Kiam J.L.Runeberg estis sana, li ne nur verkis kaj instruis. Li ŝatis ĉasadon kaj fiŝkaptadon. Sur unu muro de la hejmo pendas deko da vulpovostoj kaj fusiloj. Lia plej fama verkaĵo eble estis **Fänrik Ståhls sägner** (Rakontoj de la subleŭtenanto Stol), kiu priskribas la militon en 1808–1809 inter Svedio–Finnlando kaj Rusio. Liaj idealoj kaptis la svedlingvan kaj finnlingvan popolojn kaj profunde enradikiĝis: virkuraĝo, braveco ĝis morto, heroismo, patriotismo. El lia plumo fluis ankaŭ sesdeko da religiaj himnoj, li ja estis studinta por fariĝi pastoro aŭ episkopo. Li verkadis romantikajn ampoemojn, li admiris kaj laŭdis finnajn kamparajn pejzaĝojn kaj t.n. ordinarajn homojn. En longa poemo pri bienulo loĝanta en Saarijärvi (*Bonden Paavo, aŭ Högt bland Saarijärvis moar*) li rakontas pri terkulturisto kiu ne perdas siajn esperon kaj entreprenemon malgraŭ la malsato kaj rikoltperdo. Kiam li fine havas bonan rikolton, li petas la edzinon miksi en la sekalan farunon saman kvanton da "faruno" muelita el moleta subtavolo de la pinŝelo. Tian "farunon" finnoj ja uzis dum longaj periodoj da malsato kaj rikoltperdo.

La finnan nacian himnon **Nia lando** (*Vårt land*), finne *Maamme*, Runeberg verkis en la

sveda. Ĝin poste komponis *F. Pacius* kaj finnigis *P. Cajander*. Ĝi estis la unuan fojon publike prezentita en Helsingfors, en la Floratago, la 13an de Majo 1848. Tiam Finnlando estis aŭtonoma parto de la cara Rusio.

La vortoj de la kanto legeblas ĉe la granda statuo pri J.L. Runeberg meze de la Esplanado en Helsingfors. La statuon skulptis lia filo *Walter Runeberg* (1838–1920), kies muzeo staras kaj viziteblas apud la hejmo de la familio Runeberg en Borgå.



La plej granda statuo pri Runeberg, kun la vortoj de la kanto *Vårt land* kaj la *Junulino Finnlando* (finne *Suomi-neito*).

Ĉiujare ekde 1986 estas aljuĝata Premio Runeberg, 20 000 eŭrojn, al iu finna verkist(in)o. La mono por tio venas de finnaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La premiato ricevas ĝin en la 5a de februaro, la Runeberga tago.

**Ĉe fonto**

1. Ri - gar - das mi ad - mi - re vin ho  
bri - la, pu - ra font', kaj vi - das, ki - el  
mo - vas sin im - po - na nu - ba mont'. Kaj

2. Kaj jen alia kiel or' flamegas en rebril'.  
::Sed tuj ĝi flugas ree for per venta la flugil'::

3. Simile en anima font', en reva homa kor'  
::briletas la trezora mont', sed trompas falsa or'::

La lirika poemo "Vid en källa" de J.L. Runeberg. Tradukita en esperanton.

Maamme en Jutubo:

<https://www.youtube.com/watch?v=IM2Lr3NqUcg>

# Konkludoj pri ĉielo kaj ombroj

de Carl-Olof Selenius

Kelkfoje ni pensas, ke ni scias pli pri la ĉielaj fenomenoj ol niaj prapatroj. Tamen ili sciis aferojn, kiuj ne estas evidentaj al modernaj homoj. Ili havis proksimume la saman steloĉielon por rigardi kiel ni, sed ni havas tiom da aliaj farendaĵoj vespere, ke ne troviĝas tempon por pensado pri tio, kion ni vidas sur la ĉielo. Ni ankaŭ ne pensas, ke tio, kion ni vidas sur la ĉielo, estas tre grava por ni. Ekzemple, se ni volas juĝi la morgaŭan veteron, ni rigardas televidon aŭ retpaĝon kaj ne la lunon, kiel homoj antaŭ cent jaroj faris.

Oni ne kredu, ke ĉiuj homoj en la malnova tempo estis grandaj spertuloj pri astronomio nur ĉar ili supozeble havis multe da tempo

por rigardi la ĉielon. Homoj devis rapidi tiam kiel nun, ili faris malĝustajn konkludojn tiutempe kiel nun. Sed ili ofte sciis, kie leviĝas kaj kie subiras la suno kaj la luno, kiam aperas ili alte kaj kiam malalte, kaj kiel ŝanĝiĝas la aspekto de la luno de tago al tago.

Kiam oni rigardas ĉielajn fenomenojn, ĉefe gravas observi kie aferoj estas vidataj, tio estas, en kiu direkto. Tiun oni povas kompari kun la direkto de aliaj fenomenoj aŭ kun antaŭaj observoj.

Jen kvar bildoj. Rigardu ilin kritike. Kio estas malĝusta? Ĉiu bildo estas iel erara. Pensu iomete, poste kontrolu viajn respondojn.



Jen la eraroj de la bildoj:

1. La eraro sur la plej supra bildo estas, ke kaj la domo kaj la arbo havas la ombron sur sia suna flanko. – La suno estas en la dekstra parto de la bildo. Tiam la ĵetita ombro de la domo ne povas esti ĵetita dekstren, kaj la dekstra flanko de la arbotrunko devus aperi pli hela ol la maldekstra flanko.
2. La eraro sur la dua bildo estas, ke la nuboj havas ombrojn sur sia suna flanko. – La suno estas videbla pli malsupre en la bildo ol la nuboj kaj pro tio la supra rando de la nuboj devus aperi pli malhela ol la malsupra rando.
3. La eraro sur la tria bildo estas, ke la luno havas la ombrojn sur sia suna flanko. – La ombra flanko estas tiu, kiu ne estas desegnita – ĝi estas videbla kun la sama helblua koloro kiel la cetero de la ĉielo. Tiu ne-desegnita parto devus esti for de la suno.
4. La eraro sur la plej malsupra bildo estas, ke tri steloj vidiĝas sur la ĉielo. Oni neniam povas vidi stelojn kiam la suno videblas. La





abundo de lumo venanta de la suno nevidebligas stelojn. – La suna radiado difuziĝas de molekuloj de la atmosfero kaj igas la ĉielon aspekti helblua kiam la suno videblas. (Krome, oni kompreneble ankaŭ povas kontraŭi, ke la steloj estas desegnitaj tro grandaj, sed tio eble estas libereco, kiun

la artisto povas permesi al si por klarigi, ke ili estas steloj.)

Tiaj konkludoj estas esencaj, kiam oni volas kompreni, kio okazas sur la cielo, ekzemple pri la luno. La ĉielobservanto estas kiel detektivo.

## Invento por pluva tago



Mi pensas ke viroj – junaj kaj maljunaj – malŝatas porti aĵojn. Ili volas havi neokupitajn manojn, ĉu ne?

Tial ili inventas helpilojn. Jen junulo, kiu pensas ke li povas porti ombrelon samkiel dorsosakon. Porti sakon en la mano ne nepras. Oni ja povas pendigi ĝin. Fine li sentas sin preta piediri en la pluvo.

**Josef Kříž** el Ĉeĥio sendis bildserion, el kiu mi prenis kvin bildojn. /Siv



## Strebo al pli solida naturo

La fosado en la tero fare de la duonsovaĝaj bienaj porkoj profitigas kaj turtojn kaj merlojn, kreante reproduktejojn por la plej ŝatataj plantoj de la respektiva specio.

Antaŭ dudek jaroj, la granda ŝanĝo komenciĝis sur la bieno Knepp, tuj sude de Londono. La laktobovinoj kaj la granda maŝinparko estis venditaj. Anstataŭe, la vegetaĵaro en kampaj




Foto: Knepp Rewilding Projekt.

randoj, heĝoj kaj arbokurtenoj devis invadi la kampojn memvole. La kampoj fariĝis sovaĝaj.

Por malhelpi ke la superkreskaĵo iĝu totala, kadro de paŝtantaj bestoj estis kunmetita. La ideo estis ke ili imitos kiel eble plej proksime la originan aron de grandaj mamuloj, kiuj ekzistis antaŭ ol la homo ŝanĝis ĉion. En Knepp, la bovinoj estas anglaj longkornbovoj (anstataŭ uroj). Troviĝas Tamworth-porkoj (anstataŭ aproj) kaj Eksmoor-poneoj (anstataŭ sovaĝaj ĉevaloj) – same kiel grandcervoj kaj damaoj tie paŝtiĝas.

La rezulto estis riĉe flora savan-simila mozaiko de arbaretoj kaj arbedo kaj herbejo. La biodiverseco reagis rapide. Specioj kiuj estas tre minacataj en la resto de la tre farmita angla kamparo rapide pliiĝis en Knepp. En mallonga tempo, la areo fariĝis rifuĝejo por najtingaloj, turtoj, mergulpapilioj – kaj por homoj, kiuj sopiras al esperiga konservadrakonto.



Bone ke novaj libroj aperas dise en Esperantujo. Nun temas pri "La Timulo" verkita de Pál Békés kaj **tradukita en Esperanton de Lenke Szász**. Lenke ĵus sendis ĝin al mi. Pro tempomanko mi nur legis la du unuajn ĉapitron. Tro frue skribi ion pri ĝi?

Jes, kompreneble! Tamen permesu al mi skribi kelkajn liniojn! La unua impresio estas ke temas pri bela libro, kiu celas junajn legantojn, sed eble povus esti ankaŭ **mesaĝo en la tutmonda klimatkalkulo**. Mi ne scias.

## La gazeto Hallands Nyheter skribas en 1 februaro:

*Defia Greta Thunberg ĉe tribunalo en Londono.*



Klimata aktivulo Greta Thunberg, Svedio, estis kondukita antaŭ tribunalo en Londono ĵaŭdon, akuzita je perturbo al publika ordo.

– **Ni devas memori kiu estas la vera malamiko. Kion ni defendas? Kiujn estas niaj leĝoj celitaj protekti?** ŝi daŭrigis. Thunberg kaj 26 aliaj aktivuloj estis akuzitaj je blokado de la enirejo al hotelo kie okazis naftogasa konferenco en oktobro. Thunberg kaj aliaj manifestacioj iris brako en brako ekster la hotelo kaj devis esti forportitaj de la polico.

Ŝi neas la akuzojn, same kiel kvar aliaj kunakuzitaj aktivuloj kiuj aperis en tribunalo samtempe. En la proceso ŝi estis malkondamnita de ĉiuj akuzoj. /Siv

## Rumana libro, nun tradukita en Esperanton

La roluloj loĝas en arbaro, iam sekura loko, sed nun oni faligas la arbojn. La roluloj reagis malsame.

Timulo loĝas en groto kun granda biblioteko. Li kutimas – almenaŭ antaŭ la "katastrofo" – laŭtlegi por la aliaj estaĵoj.

Se vi volas aĉeti ĝin, sciigu min kaj mi donos al vi la adreson de **Lenke Szász**. La libro ampleksas 90 paĝojn. /Siv

# Vinterhämplingar – Vintraj kanabenoj

de Renate Säfström



Ett trevligt kvitter skvallrar om vinterhämplingar på den isiga strandängen.

Små och välkamouflerade halkar de omkring, mumsar på fröställningar och släcker törsten med snö.

Agrabla pepado rivelas la vintrajn kanabenojn sur la glacia strandherbejo.

Malgrandaj kaj bone kamuflitaj ili ĉirkaŭglitas, mordetas sur infloreskoj kaj kvietigas la soifon per neĝo.



# Sonas muziko de Bielsko-Biała, Pollando

Jerzy Georgo Handzlik kun sia pli juna filino Dominika muzikas.



En Bielsko-Biała [bjelsko bjaŭa] loĝas Georgo Handzlik, konata trubaduro en Esperantujo. Iam li ĉiun jaron vizitis la popolaltlernejon en Karlskoga, Svedio, por instrui Esperanton. En Lesjöfors li distris nin per sia gitaro kaj bela voĉo kaj li ankaŭ teatris. Tiam liaj filinoj estis etaj.

Antaŭ kelkaj tagoj mi interrete ekvidis du fotojn de Bielsko-Biała, kiujn mi sendis al Georgo, petante iun tekston pri lia urbo. Malsupre vi legu ĝin, sed unue aŭskultu kiam patro kaj filino muzikas dum UK en Lisbono

2018. Jutube:

<https://www.youtube.com/watch?v=S7QtmOlc2ek>



## Esperanto en mia juneco

La fotoj, pri kiuj vi demandas vekis fortajn emociojn en mia koro.

Mia mezlernejo, kie mi eklernis Esperanton, situis vid-al-vide de Placeto de Esperanto kaj de Zamenhofstrato, rekte en la centro de la urbo.

La lernantoj de mia lernejo spontane, kelkfoje en la jaro vizitis la placeton por purigi

la benkojn de kolomba guano. Dum la paŭzoj inter la lecionoj ni ofte sidis sur ili, iom flanke de okuloj de la profesoroj.

Mia liceo estis la unusola en la urbo, kie oni povis lerni Esperanton. Instruis ĝin profesorino Irena Horodecka. Mi lernis libervole en la klubo, sed postaj, pli junaj

gelernantoj lernis ĝin devige same kiel la anglan, italan aŭ francan.

Kial? La direktoro de la liceo, Wojciech Jakubiec estis Esperantisto – admiranto. Li ŝategis la ideon, eĉ komencis viziti la unuajn lecionojn, sed baldaŭ poste la laboro administri la lernejon malebligis al li daŭrigi. Post kvar jaroj de mia lernado venis tempo de fina ekzameno. La ministerio komence ne permesis, ke la ekzameno okazu pri Esperanto, lingvo neagnoskita de la ministerio. Tamen la direktoro diris al mi: ni dividu la taskojn. Vi lernu kaj mi konvinku la ministron.

Post lia vica vizito en Varsovio la ministro cedis. La direktoro fanfaronis pri sia venko kaj mi... timis pri tiu kroma ekzameno, kiun mi libervole aldonis al miaj devigaj. La direktoro invitis ĉiujn instruistojn de fremdaj lingvoj de la lernejo partopreni la ĵurion.

La unuan demandon, helpe de eta karteto, starigis al mi la direktoro mem. Lia celo estis prezenti al la fremdlingvaj instruistoj, ke la nivelo de kvarjara lernado de Esperanto estis multe pli alta ol tiuj de aliaj lingvoj. Li evidente sukcesis.

Tiu esperanta maturiga, ekzameno estis unu el nur du en la historio de pola eduka sistemo oficiala, ŝtata, abiturienta ekzameno. Feliĉe tiu honoro trafis ĝuste min. La direktoro,

same la instruistino, ne plu vivas kaj Esperanto ne plu funkcias en la liceo, kiu nun situas kelkajn kilometrojn for de la malgranda, verda placeto Esperanto. Pri mia filino Dominika Handzlik, kiun esperantistoj povis ekkoni ĉefe dum nia komuna koncerto ĉe la UK en Lisbono kaj la turneo tra Francio kaj Belgio? Ĉi finis Teatran Akademion en Krakovo, dum unu jaro aktorin en teatroj de Bielsko-Biała, Krakovo kaj Varsovio. Poste ŝi ricevis stipendion de Fulbright kaj flugis al Nova Jorko por plu studi aktoradon ĉe Universitato en Bruklino. Ankaŭ ŝi ludis en kelkaj spektakloj tie. Ĉi komponis kantojn por tri siaj koncertoj. Du en la pola, unu en la angla. Nun por kelkaj monatoj ŝi revenis al Pollando.

Kiam ŝi skribas sian CV – profesion vivhistorion, ŝi ĉiam mencias siajn koncertojn en Esperanto. Ĉi diras al mi, ke ĉiuj ŝiaj amikinoj povas skribi pri similaj atingoj, sed koncerto en Esperanto estas absoluta raraĵo, kiu diferencigas ŝin de ĉiuj aliaj. Esperanto helpas eĉ sur tiu, profesia kampo.

Revenis en mian memoron la tempoj, kiam mi ĉiujare vizitis Karlskoga'an kaj poste Lasefors'an lernejojn kaj instruis tie Esperanton al klasoj plenaj de multnaciaj studentoj. Tio estis vere bela epoko.

*/ Georgo Handzlik*

### **La domo. Teksto kaj muziko – Georgo Handzlik:**

Kelkaj emoj, sonĝaj revoj,  
Kelkaj nekombitaj pensoj,  
Tia estos nia domo  
Kaj sufiĉas por komenco.

Dum malvarmaj, ombraj tagoj  
Nin varmigis varmaj vortoj  
Ĉe kameno diros varmon  
Violonaj miaj kordoj

Ni konservos kelkajn pomojn,  
lom da malnova vino  
Ke ne manku io, kiam  
En la mondo regos vintro.

Kelkaj emoj sonĝaj revoj  
Kelkaj nekombitaj pensoj  
Tia estos nia domo  
Kaj sufiĉas por komenco

*Siv kompilis la bildojn kaj tekstojn. Dankon al Georgo kaj Dominika!*

# SAT.IROJ



## Ŝercoj

### Alkoholo

Alkoholo estas saniga, ĉar oni povas desinfekti per ĝi la manojn.

### Supa demando

– Kio estas pli bona? Haroj en la supo aŭ supo en la haroj?

### Astronomio

– Ĉu loĝas homoj sur la luno?  
– Mi ne scias.  
– Devas esti, ĉar estas daŭre hele tie.

### Embaraso

– Ĉar mankis elektro, mi devis atendi unu horon en lifto.  
– Mi diras eĉ pli. Mi devis atendi du horojn sur rulŝtuparo

### Orfo

Juĝisto: Vi murdis viajn gepatrojn. Vi estos ege punita!  
Akuzito: Kompaton! Mi estas nun orfo!

### Bestoj

A: Kiel oni metas ĝirafon en fridujon?  
B: a) Malfermi la fridujon, b) Meti la ĝirafon en la fridujon, c) Fermi la fridujon.

# EL SATIROJ aŭ SAT-IROJ

De Stefan kaj Walter Klag, Aŭstrio

**SAT.IROJ** 18a kajero.

Unua eldono Vieno 2024, Esperantojaro 138.  
Se vi havas demandon, skribu al  
[esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at)

**Vian kontribuadon por la sekva numero bonvole sendu al la sama adreso.**

A: Prave. Kiel oni metas elefanton en fridujon?

B: Kiel supre!

A: Falsa! Oni devas unue elmeti la ĝirafon.

Alia demando: Kiu besto mankas en la konferenco de la bestoj?

B: La elefanto. Ĝi estas en la fridujo.

A: Bone! Ĉu estas danĝere naĝi en riverego?

B: Ne, ĉar la krokodilo estas en la konferenco

### Premiero

Paciento: Mi estas ege nervoza. Tio estas mia unua operacio.

Kuracisto: Ankaŭ mia.

### Manko

Edzino: Kion diris la kuracisto, ĉe kiu vi ĵus estis?

Edzo: Li diris "Bonvolu 300 eŭrojn".

Edzino: Ja, bone, sed kion vi havis?

Edzo: 200 eŭrojn.

Edzino: Ne, kio mankis al vi?

Edzo: 100 eŭroj.

### Grupe

Policisto haltigas aŭton:

– Vian stirpermesilon!

– Jen.

– Estas problemo kun via foto!

– Mi estas la tria de dekstre.

# La fratoj Leonkoro kaj la Kvarteto Leonkoro

En <https://www.impresariat-simmenauer.de/kuenstler/leonkoro-quartett/> ni trovis jenon: "Leonkoro, aus dem Esperanto: Löwenherz, spielt nicht zufällig auf Astrid Lindgrens Kinderbuch über zwei Brüder an..."

**Kore salutas Oswald kaj Walter kaj Renate Klag, Aŭstrio**



*Leonkoro Quartet - Beethoven, String Quartet No. 9 in C Op. 59 No. 3 'R leonkoro quartet azumovsky'*

**The Leonkoro Quartet** is a string quartet, formed in 2019 and based in Berlin, Germany.

In April 2022, the quartet won first prize and no less than 9 of the special prizes at the prestigious Wigmore Hall International String Quartet Competition in London, despite being the youngest quartet competing, with an average age of just 24.

They followed this in May by winning the Bordeaux International String Quartet Competition, also winning the Audience Prize.

**La Leonkoro Kvarteto estas** arĉa instrumenta kvarteto, formita en 2019 kaj bazita en Berlino, Germanio.

En April 2022, la kvarteto gajnis unuan premion kaj ne malpli ol 9 el la specialaj premioj ĉe la prestiĝa Wigmore Hall International String Quartet Competition en Londono, malgraŭ esti la plej juna kvarteto konkuranta, kun averaĝa aĝo de nur 24.

Ili daŭrigis tion en majo, gajnante la Bordeaux International String Quartet Competition, ankaŭ gajnante la Spektantaro-Premion.

## La fratoj Leonkoro de Astrid Lindgren

**Bröderna Lejonhjärta** estas fantazia aventurromano de Astrid Lindgren kiu estis publikigita en la aŭtuno de 1973. Simile al pluraj el la aliaj libroj de Lindgren, la libro pritraktas, por la porinfana literatura ĝenro, nekutime pezajn kaj malhelajn temojn, kiel

**Bröderna Lejonhjärta är** en fantasy-äventyrsroman av Astrid Lindgren som publicerades hösten 1973. I likhet med flera av Lindgrens andra böcker behandlar boken, för barnlitteraturgenren, ovanligt tunga och mörka teman, såom sjukdom, död, självmord,

ekzemple malsanon, morton, memmortigon, tiranecon, perfidon kaj subpremon, kiuj postulas ribelon. Ankaŭ elstaras brilaj kaj varmaj temoj, kiel gefrata amo, lojaleco, espero, kuraĝo kaj neperforto.

La rakonto temas pri la fratoj Jonatan kaj Karl Leonkoro. Origine la fratoj estis nomitaj Leonoj, sed post kiam ili forpasis ili venas al Nangijala, lando preter la steloj kie ili ricevas sian novan familian nomon.

En Nangijala, la fratoj travivas aventuron kaj kune kun aliaj rezistantoj ili batalas kontraŭ la subpremo de la malbona Tengil kaj la drako Katla. La libro estas ilustrita de Ilon Wikland kaj pli poste Jesper Waldersten. Ĝi estis tradukita en ĉirkaŭ kvindek lingvojn kaj estis filmita en 1977 en Svedio. Tradukita esperanten en 1987 de Kerstin Rohdin.

La romano havas duoblan fundon kaj ebligas interpreton kaj kiel fabelo kun religia simbola lingvo kaj kiel realisma rakonto, kie ĉiuj supernaturaj eventoj – krom la finaj vortoj de la libro – okazas en la febrosongoj aŭ revado de la mortanta Karlo.

tyranni, förräderi och förtryck som kräver uppror.

Framträdande är också ljusa och varma teman, som syskonkärlek, lojalitet, hopp, mod och ickevåld.

Berättelsen handlar om bröderna Jonatan och Karl Lejonhjärta. Ursprungligen hette bröderna Lejon, men efter att de avlidit kommer de till Nangijala, ett land bortom stjärnorna där de får sitt nya efternamn.

I Nangijala upplever bröderna äventyr och tillsammans med andra motståndskämpar för de kampen mot den ondskefulle Tengils förtryck och draken Katla. Boken är illustrerad av Ilon Wikland och senare Jesper Waldersten. Den är översatt till ett femtiotal språk och filmatiserades 1977 i Sverige. Översattes till esperanto 1987 av Kerstin Rohdin.

Romanen är dubbelbottnad och möjliggör tolkning både som saga med ett religiöst symbolspråk och som realistisk berättelse, där alla övernaturliga händelser – förutom bokens slutord – utspelar sig i den döende Karls feber- eller dagdrömmar.



Antaŭ multaj jaroj Bo Sandelin gvidis esperantan kurson en Gotenburgo. Kiel kurslibron ni havis La fratoj Leonkoro.

Tre praktike havi lernolibron kaj esperante kaj svede. /Siv

*Maldekstre la libro, dekstre la filmo.*





# Violonistoj sur la kortoj de Gotenburgo antaŭ longe Spelemän på Göteborgs gårdar för länge sedan

de/av Hans Dagerteg

*Hans Dagerteg loĝas de multaj jaroj en Gunnilse, en la stacidoma ejo. Li nun estas pensiulo kaj partoprenas en multaj ne-profitaj organizaĵoj. Li ankaŭ estas eminenta hundbredisto de la Welsh Corgi-raso kaj gajnis multajn premiojn kaj laŭdojn por siaj bonaj hundoj. Nun li parolas en Fejsbuko pri sia infana kaj junaĝa tempo meze de Gotenburgo kaj li ŝatus transdoni ĉi tiun historion al Ora Ĵurnalo. /Ingegerd Granat*

**Mi estas efektive tre feliĉa**, ke mi spertis ĉiujn iamajn originalulojn, kiuj promenadis tra la stratoj, kortoj kaj placoj de la malnova Gotenburgo.

Tiu, kiun mi unue ekkonis, estis la "Violonisto", kiam li promenis tra la kortoj en la malnova Annedal.

La nomo de la violonisto estis John Erik Eriksson, naskita en Ytterby en 1896 kaj mortinta en 1991 en Fjällbo. Hodiaŭ, statuo de li staras en la korto en la kvartalo Traktören en la urboparto Västra Nordstaden.

Li iris de korto al korto kaj ĉiam estis aro da infanoj sekvantaj lin, helpante kolekti ĉiujn moneretojn, kiujn la dommastrinoj ĵetis malsupren sur la kortojn, enpakitajn en klozetpapero. Multaj asertis, ke li havis nur sandviĉojn en la violonujo, sed mi efektive aŭdis lian grincan violonludon.

Evald kun sia plenplena aĉetĉaro mi ofte renkontis kiam mi laboris en la urbocentro. Li estis plejparte ĉirkaŭ Brunnsparken kaj Nordstan. Kaj ne estis lanaj ŝtrumpetoj en liaj ŝuoj, sed gazeta papero. Li ĉiam estis feliĉa kaj gaja, kiam li hazarde trovis iun restaĵon de

*Hans Dagerteg har bott många år i Gunnilse, i stationsområdet. Han är nu pensionär och deltar i många ideella sammanhang. Han är också en framstående hunduppfödare av rasen Welsh Corgi och har tagit hem många priser och lovord för sina fina hundar. Nu berättar han på Facebook om sin uppväxt mitt i Göteborg och han ville gärna förmedla denna historia till Ora Ĵurnalo. /Ingegerd Granat*

**Jag är faktiskt mycket glad** att jag har fått uppleva alla gamla original som gick runt på gator, gårdar och torg i gamla Göteborg.

Den som jag först fick uppleva var "Fiolmannen" när han gick runt på gårdarna i gamla Annedal.



Fiolmannen hade namnet John Erik Eriksson, född i Ytterby 1896 och död 1991 i Fjällbo. Han står idag staty på gården i kvarteret Traktören i Västra Nordstaden.

Han gick från gård till gård och det var alltid en skock med barnungar som följde efter honom, som hjälpte till att samla upp alla småpengar som husmödrarna slängde ner på gårdarna, invirade i dasspapper. Många har påstått att han hade endast smörgåsar i fiollådan, men jag har faktiskt hört hans gnisslande fiolspel.

Evald med sin fullpackade kundvagn träffade jag ofta på när jag jobbade inne i centrum och han höll mest till runt Brunnsparken och Nordstan. Och det var inga raggsockar han hade i skorna, men däremot tidningspapper. Han var alltid lycklig och glad när han råkade

hakviandaĵo aŭ kion ajn kion li trovis, kaj estis nur afero de purblovi ĝin antaŭ ol manĝi ĝin.

Krom tiuj uloj, estis multaj aliaj, "la onklino kun la citro" kaj aliaj, ktp. Estis ankaŭ maljunulo, kiu biciklis de korto al korto kaj akriĝis tranĉilojn. Jes, estis multe en nia vivanta urbo – TIAM.

*Hans Degerteg*



hitta någon överbliven pannbiff eller vad han då hittade, och det var bara att blåsa av den innan han åt den.

Utöver dessa fanns många andra, "tanten med cittran" m.fl. m.fl. Det fanns även en gubbe som cyklade runt från gård till gård och slipade knivar. Ja det fanns mycket i vår levande stad – DÅ.

*Hans Degerteg*

## Fritiof kaj Carmencita de Evert Taube, sveda trubaduro

Samborombon, vilaĝo eta kaj senstrata  
Ne malproksime for de Rio de la Plata  
Preskaŭ ĉe l'rando de Atlanta la strando,  
Pampa-stepo ĉirkaŭe, certe verdajn mejlojn mil  
Tien mi rajdis je vespero en april,  
Ĉar mi volis danci tangon.

Tirharmonik' kaj mandolin'  
Kaj violon' en la drinkjejon logis min.  
Jen sur benko, kun mantelo kaj kun roz'sur la  
brust',  
ripozis rava, gracia Carmencita.  
Panjo, mastrino, ĉe la mon',  
petis pri vipo, pri pistol' kaj manton',  
Mi invitis Carmencitan, kaj: "Si gracias señor,  
vamos a bailar este tango"

Carmencita, amikin',  
Ĉu vi iom amas min,  
Ĉu parolu mi kun viaj paĉjo, panjo.  
Ĉar mi volas havi vin, Carmencita.  
Ne, don Fritiof Andersson,  
Iru de Samborombon,  
se alian planon havas vi rilate min  
ol ekdanci tangon.

Ho, Carmencita, nun ne faru min tragika,  
Mi volas serĉi tuj por laboret'butika,  
Ne diboĉadi, sole ŝpari, penadi,  
mi ne ludos kaj drinkos, nur amos mi kun vi,

Jes, Carmencita, senescepte do kun mi  
vi deziras danci tangon.

Ne, Fritiof, dancu kun muzik',  
Sed mi ne kredas, ke vi taŭgas en butik'  
Kaj cetere diris paĉjo ĝuste nun, ke li scias  
kiu baldaŭ petegos la filinon.  
Vir' kun bovinoj dudek mil,  
Granda estancia, ĝi estas ja logil',  
Premiitajn bovojn, multajn ŝafojn,  
porkojn'havas li  
Kaj li dancas tre bone tangon.

Carmencita amikin'  
De riĉuloj gardu vin,  
Ne en bovoj, porkoj, loĝas la feliĉ',  
Nek oni povas ĝin aĉeti per mono,  
Riĉas amo de l'amik',  
Helpu min labori en butik',  
Kaj edziniĝinte belajn idojn havos vi  
kiuj dancos tangon.



*La kanto aperis unue en 1937 en la kolekto de Evert Traube (Evert Taubes bästa). Taube rakontas pri Fritiof Andersson, kiu en aprilo 1932 dancas tango kun la dolĉa Carmencita en la vilaĝo Samborombon kaj petas ŝin en edziĝo, sed ricevas neon. Se vi volas aŭskulti la melodion, kantata de la filo de Evert:*

<https://www.youtube.com/watch?v=HeK2iq1Hcvg>

## "Tusen och en natt" – Esperantoseminarium på Visingsö 7–9 juni 2024

På försommaren 2024, 7–9 juni anordnar Göteborgs Esperantoförening ett språkseminarium på Visingsö som den polske esperantisten **Andreo Bach** kommer att leda under lördagen den 8:e juni.

**Fredagen den 7:e juni** är en res- och samlingsdag.

Vi äter middag tillsammans och presenterar och installerar oss, umgås eller vilar.

**Lördagen är en "arbetsdag"** och vi samlas efter frukost i samlingsalen där vi genomför dagen i grupper som är blandade så att den som kan mer stöttar den som kan mindre. Under lördagen gör vi avbrott för lunch och kaffepaus.

Vi avslutar med middag och samkväm.

**Söndagen startar vi med frukost** och "Remmalag" runtom på Visingsö. (Betalas särskilt, 195 kr.)

Vi avslutar med lunch och utvärdering.

Det är vår förhoppning att vi skall ha skaffat nya bekansheter och gjort framsteg på språkområdet men framför allt att vi har haft en underbar upplevelse på Visingsö.

Varmt välkomna, det kan ju bli väldigt trevligt!



### Praktisk information

**Resa** Var och en åker på egen hand till färjeläget i Gränna.

**Boende** Varje deltagare som kan tänka sig bo i dubbelrum betalar 650 kr/natt, dvs. för två nätter blir det 1300 kr. Deltagare som önskar enkelrum betalar 1300 kr/natt, dvs. för två nätter blir det 2600 kr.

**Måltider** Det är beställt sex måltider per person, varje måltid kostar 150 kr, dvs. 900 kr/person. Meddela om du har allergier, speciell diet osv.

**Kursavgiften** är 500 kr/person. Den skall täcka avgifter för seminarieledare och administration. (Kursavgiften återbetalas endast om seminariet måste ställas in.)

Sammanlagt blir det alltså 2700 kr/person för seminariehelgen, eller 4000 kr för den som vill ha enkelrum.

**Anmäl dig** via [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se) För giltig anmälan ska kursavgiften vara inbetald senast 2024-03-07 till Göteborgs Esperantoförening, plusgiro 43612-1.

**För mer information** kontakta Ingegerd: [ingegerd.granat@gmail.com](mailto:ingegerd.granat@gmail.com)

